# Estraro de TEJO novfara en Novara

JUNE KAJ KUNE

Jen resumo pri la estrarkunsido de TEJO okazinta en la norditala urbo Novara inter la 12a kaj 14a de aprilo. Ĝi traktas ĉefe temojn interesaj al UEA kaj ILEI; pli kompleta raporto venos de TEJO.

## Subteamaj listoj

TEJO proponas al UEA starigi retan diskutliston por ĉiu subteamo: Mastruma, Movada, Monda. TEJO liveris nomaron de aktivuloj por ĉiu listo. Aldonotaj estu ankaŭ konsilianoj kaj aliaj aktivuloj, interalie de ILEI. Konsentite, ke la listo por la subteamo 'Movado' have du gvidantojn, unu de UEA, unu de TEJO.

## Membrovarbado

Proponite pli klare indiki al membremuloj transpagmanieroj en landoj kie tio starigas obstaklojn. Evoluigo de retaj aliĝiloj dezirindas, por membreco, por IJK kaj aliaj gravaj aranĝoj.

## Internacia Junulara Kongreso (IJK)

Por efikigi la elekton de kongreslandoj, kaj la postaj pretigoj, difinendas kiomgrade TEJO organizas la Kongresojn.Kompilindas tabelo kun du kolumnoj: kion prizorgas TEJO; kion (L)KK. Malnovaj gvidiloj pri IJK-organizado povos utili en la verkado. Kandidatoj por inviti IJK vidu la dokumenton.

## Eksteraj rilatoj

TEJO sendis ampleksan liston de TEJO-kunlaboremuloj por KRIO al UEA, sed tio ne alvenis. Jen praktika utilo de la decido, ke UEA, TEJO kaj ILEI allasas observantojn unu de la alia. Ene de ses horoj la miso estis riparita, kaj la KRIO-listo signife kreskis, kvante kaj kvalite.

## Edukaj eksteraj rilatoj

TEJO reage al la dulingva varbilo de ILEI emus esplori, kiuj estas la plej interesaj junularaj priedukaj organizoj. Aliroj okazu kunlabore kun la eksterrilata laboro de ILEI kaj UEA.

## Aktivula Maturigo (AMO) kun UEA

TEJO ricevis inviton proponi mal-aziajn junajn gvidantojn kun kono de aziaj bezonoj por la tria AMO-seminario en Ĉinio, kaj ankaŭ por aliaj seminarioj pri Aktivula Maturigo. Por fortigo de azia laboro, TEJO nomumis membron el Vjetnamio por la azia komisiono en UEA, KAEM.

## Junularaj renkontiĝoj en Centra Eŭropo

Aŭtune nun okazas kvar renkontiĝoj en la Visegradaj landoj (PL, CZ, SK, HU). Esplorinda ĉu kuntiri ilin al du internaciaj aranĝoj, ambaŭ kun ia trejnada enhavo sub ombrelo de TEJO.

## Kursoj por landoj sen TEJO-sekcioj

Iuj landoj sopiras je intensaj kursoj. TEJO proponu al UEA landojn, kie indus fari kampanjon. Ekzistas plano sendi instruiston al strategie gravaj landoj, kiuj petas tion. La skemo estu: Loka lando solvas loĝigon kaj surlokajn kostojn, TEJO pagas flukostojn. UEA aŭ ILEI devus fari ion similan – laŭ la ĝis nun nerealigita ideo de 'kursa bazaro' – retejo kie anoncu sin kursgvidantoj kaj kursdezirantoj.

## Simpatiantoj

Renovigo de la membro-kategorioj leviĝis, surprize en la subgrupo pri Eksteraj Rilatoj. Por ke TEJO membriĝadu en Eŭropaj instancoj, estas postulo, ke ili havu signifan nombron da membroj ene de Eŭropo. Tial TEJO serioze interesiĝas pri baldaŭa starigo de sistemo por simpatiantaj membroj, kiuj ja pagos rekte nenion. La sperto de <lernu.net>, kaj ŝatoj ĉe Facebook montras, ke atingo de la necesa nombro ne estas fantaziaĵo. UEA havas en la Strategia Plano imagon pri simila plano, tre dezirindos, ke UEA kaj TEJO kunlaboru en la konceptado kaj eble realigo de tiu skemo. Eble la bezonoj de TEJO spronos nin en UEA rapidigi la ekpaŝon laŭ tiu vojo. TEJO sendis al UEA proponon pri reformo de la membrosistemo kun kategorio por simpatiantoj, kiun la Mastruma teamo en UEA skajpe traktos.

## Strategio mojosa

Cerbo-ŝtormade oni dimanĉ-vespere ekkompilis strategion 2014-2017. Alvoko al sekcioj liveris serion da rekomendoj, laŭ antaŭplanita strukturo. La proponoj estis elprintitaj kaj kuŝigitaj sur longa tablo. Ili estis arigitaj lau la kriterioj de la plano de UEA: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigo (kiu surprize, altiris la plej grandan kvanton da reagoj). Poste en du teamoj, estraranoj studis po unu el la kampoj, poste interŝanĝis rolojn, tiel ke post trakto de la restintaj du K-temoj, ĉiu estrarano okupiĝis pri ĉiu temo, proponinte revortumojn, sed ne sen viglaj debatoj inter starantaj/promenantaj estraranoj. La rezultoj estos poste plue kompilitaj, cele al proponebla plano por la nunjara IJK.

La kunsidado daŭros ankoraŭ duonan tagon.



Łukasz Żebrowski<br>Prezidanto de TEJO

Stefan MacGill<br>Vic-prezidanto de UEA